# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 01/09/2022 Kvincentnaŭdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 689,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **158,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **139,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **94,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )




## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

**BICIKLI KIEL EN NEDERLANDO**

27a aŭgusto 2022

Karaj Amikoj NOTU! Numero 600 de AE post du semajnoj kaj eble 601 precize 11 jarojn post unua de 2011, eble unu semajnon pli poste! Kion povus eksteraŭstraliaj gelegantoj, kiel mi, kontribui? s-ro Ueli HAENNI

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



# MI RESPONDECAS PRI MIA FAMILIO.

IMAGU LA KAZON, KE MI HAVAS EN MIA FAMILIO OKJARAN KNABON, KIU NE VOLAS ESTI MEMBRO DE MIA FAMILIO, KAJ EĈ ELIRIS, LOĜANTE EN ALIA FAMILIO. KION VI PROPONAS KE MI FARU? KOMPRENEBLE MI ZORGAS, KE LI REVENU AL SIA ORIGINA, MIA, FAMILIO, SE NECESE MI FAROS TION KUN FORTO. MI RESPONDECAS, KAJ PRAKTIKE DEZIRAS RESPONDECI, PRI LA KNABO. EĈ SE MI DEVAS FARI “MILITON” PRI TIO.. TION VI ĈIUJ ATENDAS KE MI FARU.

Imagu ke en via lando, kiu ja konsistas el diversaj partoj pri kiuj respondecas la federacia registaro , la parto “Vestralio” decidas eliri el Aŭstralio kaj faras tion praktike, kaj eble kunigas sin al alia lando, ekz. Hindujo aŭ Timorlesto, aŭ eĉ Ĉinujo. Vi postulos ke la federacia registaro faros ĉion por rehavi la “filon”. la membron Vestralio, eĉ perforte se necesas. En tia kazo ĉiu persono akceptas normala, ke la “patro”, la Federacio, faru sian devon. Eĉ se Vestralio havus ekster Aŭstralio pli bonan aŭ pli liberan vivon.

La samo validas por Ĉinujo kaj Tajvano: se unu parto de Ĉinujo foriris el la familio, estas natura ke la patra registaro faru ĉion eblan por rehavi la parton. Eĉ se la patraj cirkonstancoj estas malpli bonaj. Do en Ĉinujo tiu kazo estas natura devo de la “patro” Ĉinujo perforte repreni Tajvanon, same kiel Aŭstralio reprenus Vestralion, aŭ kiel Usono retroprenus foririntan Havajon.

La samon oni povus diri pri Ukrajno: la patro Rusujo devas retropreni la filon. Malgraŭ la (stulta) fordono de iu rusa prezidanto. Eĉ Germanujo retropostulu kelkajn perditajn areojn germanlingvajn. Kaj same kiel Hungarujo retropostulu la kelkajn hungarlingvajn partetojn de Rumanujo.

Konklude: Tajvano apartenu al Ĉinujo.

*Marcel Leereved .*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).
N.ro 1 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Unu el la kvar partoj de propozicio (= frazo) estas la Predikato (= Verba Parto). Kiuj estas la nomoj de la aliaj tri partoj?

2). Kun la necesa Verbo (kun unu el la finaĵoj as, is, os, us, aŭ u), kiu alia speco de vorto povas esti parto de la Predikato (krom ebla Predikativo)?

3). Kiuj du specoj de vorto povas esti la Predikativo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 598.

*Marcel Leereveld.*

## 107A UNIVERSALA KONGRESO EN MONTREALO: MIA SPERTO, DAŬRIGITA

En la antaŭa numero (AE-597), mi priskribis mian sperton dum la unua duono de la UK en Montrealo. Nun mi priskribos la duan.

Merkredo estis "libera tago" por mi. Mi decidis viziti la mirindan Muzeon de Belartoj. Tio ne estis Esperanta afero, sed mi surhavis Esperantan T-ĉemizon, do mi ankoraŭ iom subtenis la movadon!


Ĵaŭdon, mi prelegis pri *La arto de desegnado*. Unu el la spektantoj estis Sonja Lang, la kreinto de *toki pona* (Tokipono), la lingvo inspirita de zeno, kun nur 134 (oficialaj) vortoj. Sonja poste komplimentis min pri mia prelego. Vendredon, mi ĉeestis la *ŝian*, pri Tokipono. Tio estis tre populara kaj bona programero: la ĉambro apenaŭ estis sufiĉe granda por ĉiuj. Estas interese sed ne surprize vidi, ke Esperanto kaj alia konstruita lingvo povas vivi apude kaj amike, ĉar ili havas malsamajn celojn.

Ĵaŭdo-vespere okazis teatraĵo, *1910*. Tio baziĝis sur la sperto de brito, William Mann, kiu akompanis Zamenhof al la 3a Universala Kongreso en Vaŝingtono, Usono, kaj poste al Montrealo. Ĝi estis, esence, unuhoma teatraĵo, dum "William Mann" rememoris siajn spertojn; tamen pluraj anoj de la spektantaro faris diversajn (verkitajn) demandojn, kiujn la aktoro respondis, kaj je la fino, "S-ino Mann" mallonge aperis. La teatraĵon verkis Ĵenja Amis, la sekretario de la LKK. La sekvan matenon, Ĵenja gvidis tre interesan ekskurson, *Montrealo Juda*, kaj posttagmeze, prezentis pli da informo pri William Mann kaj la 3a UK dum sia prelego, *Malantaŭ 1910*.

Mi ĝojis esti parto de la unua ĉeesta UK post la komenco de la pandemio – kaj trankviliĝis, ke mi mem ne infektiĝis!



*Jonathan Cooper*


Desegnado



Malantaŭ 1910


Toki pona


Montrealo Juda


Teatraĵo



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 3a de septembro estis la unua sabato. Ĉiuj bonvenaj

*Roger Springer*



## Mesaĝo de ANF/Goma

Saluton gekaraj ,

Tiu kiu semas rajtas rikolti. Ni anoj de ANF raportas al vi la rikoltojn de viaj semoj. Do al vi ni prezentas la rezultojn de kelkaj el niaj prizorgataj georfoj post trapaso de ekzamenoj lerneje. Enmane ili tenas siajn bultenojn atestantajn iliajn sukcesojn, kaj vizitos sekvajn klasojn venotjare 2022-2023. Notindas ke pro la milito en Ukrainio, pri kiu kompreneble multaj atentas, mankis al ni monhelpo por sukcesigi ĉiujn.

Memorigante kaj pardopetante al vi helpantoj niaj pro ĝenadoj niaj jen denove entenditaj niaj manoj por peti al ĉiu laŭ sia ebleco , por ke ni ekaĉetu la lernomaterialojn uzotajn ventojare 2022-2023. Pro la nestabila prezo ni ĝojus se ni rapide akirus monon.

Koregan dankon!
Por ANF Augustin Kontakteblaj ĉe :orfojkongo@gmail.com







Post nia Zoom kunveno pasintan dimančon, mi restis apud bela Dendrobium orkido en mia paca ğardeno

*Petro Danzer*

*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). La tri aliaj frazpartoj estas la Subjekto, la Objekto, kaj la Adjektoj.
2). La Infinitivo.
3). Substantivo kaj Adjektivo.

*Marcel Leereveld.*